Esperanto en mia vivo

D-ro Imre FERENCZY (Hungario)

Kun Esperanto mi konatiĝis en jaro 1950, dum mia gimnazia studado. Ekde 1951 mi studis medicinon en Szeged kaj post 2 jaroj en la Medicina Universitato de Budapeŝto. Ĉi tie mi konatiĝis kun eminentuloj: Julio BAGHY, Kolomano KALOCSAY. Je ilia instigo mi partoprenis la landan movadon, unue en la junulara aktivado.

Mia unua korespondanto kaj amiko estis Rokuro MAKABE, japana medicina studento, poste profesoro en oftalmologio. Mi multfoje renkontiĝis kun li dum diversaj Esperanto-kongresoj kaj konferencoj.

Mi, kiel kuracisto komencis labori ekde 1957 en hospitaloj kaj ekde 1961 ĝis mia emeritiĝo (1998) mi dejoris ĉe la fervojsanitara servo en urbo Györ.

Dum la UK en jaro 1973 (Beogrado) persone mi renkontiĝis kun d-ro Hideo SHINODA kaj kun prof. d-ro Seiiĉi KATO, kaj tie en amika rondo ni babiladis pri nia UMEA-movado. D-ro Shinoda petis min esti lia privata sekretario. Mia tasko estis organizi la dumkongresajn medicinajn jarkunvenojn kaj mi devis aktivigi la esperantistajn medicinistojn en Eŭropo.

Je miaj klopodoj mi sukcesis reorganizi la fakan movadon precipe en la t.n. popoldemokratiaj landoj. En 1976 mi iniciatis organizi internacian medicinan konferencon (IMEK). Por ĝia realigo mi trovis polan farmacian studenton: Vladimiro OPOKA en urbo Krakovo. Poste ni organizis la konferencojn en ĉiu dua jaro. Ĉijare ni aranĝos la 20-an en Nitro.

Mi estis unue sekretario de UMEA kaj inter 1987-2012 ĝia prezidanto. Mi dufoje vizitis Japanion. Unue en 1991 en Yamagata ni festis la 90-an datrevenon de naskiĝo de Hideo SHINODA. Li mortis en jaro 1985. Kune kun nia tiama bulgara vicprezidanto, prof. Kiril POPOV ni vizitis la vidvinon. Akceptis nin la urbestro kaj ni partoprenis la familian bankedon. Ankaŭ ĉi tie mi dankas la Japanan Esperanto-Instituton pro la tiama grandega helpo al nia vojaĝo kaj restado.

Duan fojon en Japanio mi estis en 2007, okaze de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Yokohama. Krom la medicinistoj mi renkontiĝis kun radioamatoroj, inter ili kun japanaj geamikoj. Per mia voksignalo (HA1UD) mi jam faris multajn eterkontaktojn kun eksterlandaj geamikoj.

Nepre estas menciinde, ke d-ro SAIONJI Masayuki plurfoje vizitis Hungarion kaj instruis la specialan japanan masaĝterapion Yumeiho. Ofte mi renkontiĝis kun li kaj lia instrumetodo bone disvastiĝis tutmonde.

Mi rememoras volonte kaj ofte je miaj japanaj geamikoj, kiuj helpis mian agadon. Aparte mi dankas mian kolegon, d-ron Yasuo KIRYU, pro nia plurjara kunlaboro. Li multe subtenis mian agadon en UMEA.

UEA distingis min en 2003, de tiam mi estas honora membro de UEA.

私の人生におけるエスペラント

イムレ・フェレンツィー（ハンガリー）

私は、1950年、高等中学生の時にエスペラントを知りました。1951年からセゲド市で、その2年後からブダペスト医科大学で医学を学びました。その時に、ユリオ・バギーとコロマノ(カルマン)・カロチャイの二人の著名なエスペランチストに出会いました。二人に誘われて国レベルの運動に参加しました。初めは若者の活動に参加しました。

最初の文通相手となった友だちは、日本の医学部生で後に眼科の教授となった真壁禄郎さんでした。私は、様々なエスペラントの大会で彼と何度も会いました。

私は、1957年から医師として病院で働き始め、1961年から1998年に退職するまでジェール市で鉄道衛生の仕事をしました。

1973年のベオグラードの世界大会で、篠田秀男先生と加藤静一教授と出会いました。大会の親睦会で、私たちの世界医学エスペラント協会(UMEA)の活動について親しく話し合いました。篠田先生に自分の秘書になるように頼まれました。私の仕事は、世界大会で医学の定例会合を組織することで、ヨーロッパのエスペラント医師の活動を活発にしなければなりませんでした。

努力の甲斐もあって、特にいわゆる人民民主主義諸国で専門分野の活動を再結成することに成功しました。1976年には世界医学エスペラント大会(IMEK)を主導しました。その実現のために、ポーランドのクラコフ市の薬学部生ウラジミール・オポカ氏に出会いました。その後、私たちは、大会を2年に1度ずつ開催しました。今年はニトラ市で第20回大会を開催します。

私はUMEAの書記になり、その後、1987年から2012年まで会長を務めました。日本には2回訪れました。初めは1991年の山形市訪問で、1985年に亡くなられた篠田秀夫先生の生誕90年記念の会に参加するためです。当時のブルガリアの副会長のキリル・ポポフ教授と一緒に未亡人を訪問しました。市長が歓待してくれ、家族との食事に招待してくれました。その際に日本エスペラント学会が私たちの旅行と滞在に大変ご尽力していただいたことにこの場を借りてお礼を申し上げます。

2回目の日本訪問は2007年で、第92回の横浜世界大会に出席しました。医師以外に、日本人や外国人のアマチュア無線家と会いました。HA1UDというコール・サインで外国の友人と多くの無線交信をすでに行っていました。

西園寺正幸先生が何度もハンガリーを訪問し、独自の日本式マッサージ療法である湧命法を指導したことについて言及しない訳にはいきません。私は何度も先生と会いました。先生の指導法は広く世界に普及しました。

私の活動を助けてくれた多くの日本人が自然に思い出されます。特に、桐生康生先生には、幾年にも及ぶ協力に感謝します。先生はUMEAの活動をとても支えてくれました。

世界エスペラント協会は私を讃えてくれ、2003年にUEA名誉会員になりました。

（訳：桐生康生）